FREŜA VENTO № 7.
LATVIO BET ★ 57 Vendredo, la 21-a de julio

La PROGRAMO de la 57-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj:

SABATO, 22.07.

9.00 – 10.00	Matenmanĝo	Studenta hotelo, 1-a etaĝo
	Forveturo	

SALUTMESAĜO AL BET DE LA PREZIDANTO DE UEA

Karaj BET-kongresanoj de la 57-a renkontiĝo en 2023,

Estis por mi granda plezuro ĉeesti la pasintjarajn BET-tagojn kaj konatiĝi kun via mondkonata aranĝo kaj kun multaj al la ĉeestintoj, kaj pro tio mi deziris sendi mallongan mesaĝon dum vi kongresas ĉi-jare. La diskutoj dum la aranĝo en Klaipėda helpis al mi kompreni vian situacion, ne nur pri Esperanto sed rilate al la daŭraj defioj kiujn frontas la regiono.

Estis aparte laŭdinda la iniciato de la Latviaj esperantistoj inviti BET, por ke vi povu repreni la ritmon de renkontiĝoj serie en la tri baltiaj landoj. Vi memoras ke la unua BET okazis en Latvio en 1959, kaj via aktiva membraro multon kontribuis al la kunlaborado de la Baltiaj ŝtatoj kaj la eventoj de BET dum pli ol 60 jaroj. En 1989 vi fariĝis Landa Asocio de UEA, kaj ni tre ĝojas pri via daŭra kunlaborado.

Ni ĝojas ke daŭre restas forta scienca enhavo de viaj renkontiĝoj, kaj certe viaj diversaj vizitoj helpas al vi konatiĝi kun Ventspils kaj ĝiaj diversaj historiaj evoluoj, kiuj interalie tra astronomiaj studoj etendiĝas ekster la planedon al la universo.

Progresis la strategia laborplanado de UEA post la pasintjaraj Baltiaj Tagoj, kaj nun ni esperas ke vi trovos la tempon por plenigi la enketilon kiun ricevis niaj membroj kaj kiun ricevos ankaŭ nemembroj. Kvankam la bazan demandilon vi povos kompletigi tre rapide, mi esperas ke vi povos donaci iom de via tempo al pripensado de niaj kunaj defioj kaj sendi al ni en la komentospacoj viajn ideojn por progresigi nian movadon.

Mi esperas revidi plurajn el vi en Torino, kaj ni kuraĝigas al vi konsideri la venontan jaron, kiam okazos tute speciala UK en la ĉefa Internacia Kongresejo de Arušo, Tanzanio. Niaj afrikaj samideanoj planas amasan partprenon, kaj ni ne malpli entuziasmu pri unika evento kiu plifortigos nian movadon en tiu kontinento. Ni spertas grandan kreskon de interesiĝo pri la potencialo de nia lingvo por antaŭenigi internacian kompreniĝon kaj apogi lingvajn kaj kulturajn rajtojn kaj egalecon por ĉiuj.

La unueciĝo kiun reprezentas viaj Baltiaj Tagoj estas fundamenta por nia progreso, do profitu tiujn belajn tagojn kaj kunportu vian kunlaborigan entuziasmon en la venontan jaron. Kaj laste, ni esperas ke ĉiu el vi estos forta kontribuanto al la laboro de via Landa Asocio kaj al la plifortigo de UEA. Vi certe havas ion por kontribui al nia monda agado. Pripensu kaj sciigu nin!

Kun elkoraj gratuloj pro via bela kaj efika renkontiĝo, kaj bondeziroj por via estonta laboro.

Duncan Charters
Prezidanto, Universala Esperanto-Asocio

BET-57: Esperanto-kurso (perfektiga), gvidas **Nina Pietuchovska** (Pollando).

BET-57: Esperanto-kurso (paroliga), gvidas **Mikaelo Lineckij** (Israelo).

Pri la urbaj vidaĵoj

Oni povas vidi ĉarmajn kortojn, ĝardenojn, floraranĝojn. Iru kaj promenu! Ne nur en la moderna centro. Bone, ke Latvio ege evoluis, sed oni ne perdu la pasintaĵojn. Serĉu ilin!

Raita Pyhälä "Saliko"
(Finnlando)

Pri tagmanĝo en liva stilo

Hordea kaĉo estis festomanĝo en Finnlando antaŭ ol haveblis rizo. Kuirita dum 3-4 horoj en akvo aŭ lakto. Mia patrino rakontis, ke en iu bieno tia kaĉo antaŭ pli ol 150 jaroj estis ŝparita por geedza festo. Tamen knabino delonge malsata kaŝiris kaj manĝis grandan porcion. Ŝia korpo, pro la longa malsatego, ne toleris tiun regalon. Ŝi mortis pro troa satigo. Mi mem 19.07. ĝuis la tagmanĝon dum la tuttaga ekskurso en Livolando.

„Saliko" (Finnlando)

La trian fojon en Ventspils

La unuan fojon mi vizitis ĉi-urbon en la jaro1958 – ekskursis el Palanga pioniera tendaro al balta marbordo en Latvio. La impreso ne estis brila: tiam Ventspils estis modesta urbeto de fiŝkaptistoj. Ĝi certe ne logis iam reveni tien. Poste dum multaj jaroj ofte oficvojaĝadis al Rigo kaj Jejgava, ankaŭ vizitadis parencojn en Ruba kaj Jaundubulti, sed neniam strebis veturi al Ventspils. Tamen kiam mi eksciis pri la antaŭa BET en Ventspils, mi aliĝis senprokraste, ĉar jam legis en litova gazetaro, ke la urbo iĝis tre bela kaj alloga. Kaj estis vere mirigita. Belegaj parkoj, fontanoj, skulptaĵoj, floraj komponaĵoj, elstaraj muzeoj. Mi enamiĝis la urbon kaj kaŝe esperis, ke jam ĉi-tie okazos alia BET. Kaj ĝisatendis! Nun mi ĝojas, ke Ventspils iĝis eĉ pli ĉarma kaj allogas reveni ĝin plu kaj plu.

Inita Tamošiūnienė (Litovio)

La „FREŜA VENTO" Nr. 8 baldaŭ aperos rete.

La numeron preparis: Organiza komitato de BET-57, kompilis Genovefa Tamane.